

Registered at G.P.O. Melbourne, for transmission by post as newspaper.



La Suda Kruco

Oficiala Orĝano de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 142 (12th Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 MAJO, 1932.

LINES FOR THE TIMES.

It is safe to say that the past two years have been the most gruelling the "S.K." has ever passed through. That it is still on its feet is, to use a hackneyed but true expression, a splendid tribute to the staunch loyalty of those who have refused to allow the economic blight to paralyse their will to win through. To such the editor gives his sincere, heartfelt thanks. Tens of our old supporters have written, forced to cease subscription; scores more have lapsed mutely under the strain. More than once the editor himself has felt it impossible that the paper could survive the battery of misfortune, and has drafted the death notice for yet another press casualty. On each occasion, however, some fresh manifestation of helpful interest has inspired him to venture further along the road out of the wood. New avenues have been explored; advertisements have been solicited, complete year-issues of the "S.K." have been offered for sale, clubs have been approached for assistance in selling the gazette, cuts have been made in subscriptions of Esperantists with foreign correspondents, and a W.A. friend has suggested that honorary teachers stipulate a subscription of 5/- a year to the "S.K."

While help has come from these means, and may continue to do so, it seems fairly predicable that if the "S.K." is borne through the present crisis it will be on the shoulders of a few. This few may, perhaps, without felt sacrifice, be able so to bear it—we know nothing of that. The encouragement arises from our knowing that they are willing to pull more than their weight because, as

"conscious" Esperantists, they regard the paper as having a worthy part to play in the movement here and abroad. Rich or poor, they would not do what they do if they did not believe that.

And it is worth while. Sent to the five continents, the "S.K." has received the considered approval of eminent men of the movement in Europe, among them T. Jung, Professor Grosjean-Maupin, M. C. Butler and J. Warden, president of the Language Academy. Its lines have been cited in Esperanto book catalogs, side by side with those from the chief organs.

Care is taken as to content. The "S.K." aims to publish book reviews that say something, English translations of striking propaganda articles culled from the leading Esperanto gazettes, sketches characteristic of Australian life, passages from English press relating to interlanguage rendered into Esperanto, besides the club notes and personal pars. "Alvokoj" and similar semi-advertisement matter appear, for the most part, only if of interest or help to the Esperantist here.

Can we see the crisis out? The publication of the "S.K.," as things stand now, makes necessary the spending of every penny of current income. This, alas, means that those who pay one, two, and three years in advance see their money absorbed straight away. This should not be, but what can we do? Until the dry bones of the lapsed start to shuffle an adequate response to the "open letter" elsewhere in this issue our "publication fund" to guarantee the gazette say

two years ahead will remain a long way round the corner.

Enough! Let us join our hands in firm resolve to intensify our efforts to safeguard regular printing of our organ. "Per Dia favoro kaj homa laboro" we have brought it thus far—surely we will bring it safely through!
—REDAKCIO.

"GRAVA POPOLHIGIENA KAJ SOCIA DEMANDO."

Origine en Esperanto verkis
H. Salokannel.

La abstinence ideo kreskas en ĉiu lando. Esperanto povas esti tre utila disvastigilo por ĝi. Kun tiu celo s-ro Hugo Salokannel verkis la supretitolitan, kiu estas modesta provo doni al interesatoj koncizan lernolibreton por abstinence Esp. studentoj; prezenti eldiraĵojn de plej eminentaj fakuloj pri la alkohol-demando; doni netajn informojn pri la malpermesa leĝo en Usono kaj Finnlando; kaj interesigi la Esp-istaron pri grava socidemando.

Bone verkita de lerta samideano, la libreto plenas je sciencaj, historiaj, ekonomiaj kaj filozofiaj diroj rilate la movadon kontraŭ la alkoholo.

52-p. broŝuro. Havebla ĉe Esperanto-Instituto de Finnlando, prezo 10 finnaj markoj (2ŝ.). Mendu ĉe s-ro E. W. Chandler, 223 T. and G. Building, Collins-st., Melbourne.—(E.W.C.)

ESPERANTO ON THE MARCH.

Since last issue we have learned—

That the Spanish Esperanto Assoc. has received from the Ministry of Public Instruction a subvention that will guarantee the life of its official gazette.

That the Italian propaganda gazette "L'Esperanto," in newspaper format, is printed in 3000 copies. Printed entirely in Italian and enjoying the collaboration of eminent men, the paper is markedly stimulating the movement in non-Esperantist circles.

That "Le Bulletin de la Chambre de Commerce de Londres" in its February number published a text in Esperanto, "Ĉu tunelo aŭ pramservo?" (A (Channel) tunnel or a ferry service?).

That Father Bianchini, of Pordenone, Italy, is preparing specially for the priests a textbook of Esperanto in Latin.

That Dr. Privat, who accompanied Gandhi to India, spoke before 300 students and professors at Ramjas College, Univ. of Delhi, his subject being Esperanto and Zamenhof.

DEMANDOJ.

- (1) En kiu jaro vizitis Aŭstralion la angla kronprinco?
- (2) Post kiu oni nomis Adelaide?
- (3) Kiu estis Rozinante?
- (4) Kie mortis R. L. Stevenson, aŭtoro de "Trezora Insulo"?
- (5) Kiom da trajnoj iras tra Flinders-Strata stacidomo, Melburno?
- (6) Kiom da diametro mezuro havas la horloĝo ĉe Flinders-Strata Stacidomo, Melburno?
- (7) Post kiu oni nomis Sydney?

"ETERNA BUKEDO"

Tradukoj el 22 lingvoj, de 116 verkistoj,
farita de K. Kalocsay.

Eldonita de "Literatura Mondo,"
Budapest.

Paĝoj 352, bindo arta leda, senligna papero.

Prezo kun afranko 2.42 dolaroj.

En ĉi tiu kolekto ni havas la dolĉan distilaĵon de floroj ŝirpinĉitaj el pli ol dudeko da fremdaj ĝardenoj. Petaloj el ĝardenoj de l'propralando hungara, petaloj el la riĉodora abundo en la najbaraj, petaloj strange ekzotikaj el teroj apartigitaj de la tuta larĝeco de la mondo. Frapite ni legas, ke ĝi esence estas la ellaboritaĵo de unuopa homo, eble la nura verŝtalentulo sufiĉe bene dotita por aranĝi tian bele diversan faskegon. Ni rememoras senti ion similan, legante en "Internacia Kantaro" la nomon Bennemann ĉepiede de ĉ. 30 kantoj tute nesamlingvaj. Ho tiuj eŭropanoj!

Armita per la ekzemplo de l'granda Grabowski, Kalocsay, dum jaroj pacience studante la vojojn laŭ kiuj nia lingvo tre povas evolui, prove, pioniere ekspluatis verse ĝiajn flekseblaĵojn. Li asertas, ke kontentiga tradukado de nacilingvaj strof-gemoj en Esperanton restus neebla, se al la esperantaj versistoj estus ne permesate akceptadi ĉiam pli novajn rimedojn, por taŭgigi aŭ senbalastigi la lingvon tiam, kiom postulas tion la poeziarto. Ekzemple, pro la metrikaj necesoj ĝenas lin ofte la longaj formoj, kiaj "mallaboreme," "sinjorino," tial li ekuzas "pigre," "damo"; li tre libere utiligas la adver-

bon, ekzemple en la frazo "ekvide lin" (je ekvido al li), ŝajne plilarĝigante per tio la principon laŭ kiu oni faris la formojn "spite ĉion," "koncerne min"; foje li elizias la finaĵon de radikoj adjektivaj, "mult brilajn fratinojn."

En la ĉiutaga, kaj eĉ prozliteratura lingvo, oni devas ne enkonduki neologismojn, krom kiam la senco postulas tion por vesti nocion por kiu mankas preciza, ĝusta termino. Oni asertas, ke eĉ la poezio montriĝas jam novaj faktoroj, tiuj de la ritmo kaj de la propra spirito de la muzo. Tiun demandon, sufiĉe komplikan, la simpla homo volonte lasas al la fakuloj. Li nur petas, kaj rajte atendas, nenian perforton al la lingvo, nenian malrespekton al la bazaj-principoj de ĝi.

La angla literaturo reprezentigas per naŭ aŭtoroj, Chaucer, Milton, Spenser, Shakespere, Keats, Shelley, Poe, Tennyson kaj Browning. Iom pri "La Odo al la Okcidenta Vento" (Shelley): . . . are driven like ghosts from an enchanted fleeing ("kiel magon fantomar rifuĝa"). Tie Kalocsay donas al adjektivo "rifuĝa" potencon de la verbo "rifuganta"; ĉu oni rekonas "Baiae's" en "Baja"? Make me thy lyre, even as the forest is ("Min, kiel boskon, igu liro via"). "Boskon" ŝajnas ne sufiĉe potence majesta; kial ne "silvon" (Verax)?

Kun la escepto de la dua linio en strofo ses, kie la trokea metrikaĵo rompiĝis, Kalocsay kaptas perfekte la misteran sonorecon de "La Korvo" (Poe). Li reproduktas admiringe la tiklan personobildon de "La Priorino." Ĉe lia traduko de la komencaj linioj de "I stood tiptoe upon a little hill" (Keats) li evidente sentis mankon de unusilaba radikoj por esperantigi la anglan "buds" (burgonoj, florigoj). Por tio lia "branĉoj" tute ne taŭgas; nek "rarfoliaj" por "scantly leaved."

Troviĝas en la fina parto de la libro interesaj biografetoj de la poetoj, klarigoj pri la propra procedmaniero je la tradukado, kaj listo de neologismoj. Ĝi tamen estas tre nekompleta.

Per la supra verko kaj lia "Streĉita Kordo" Kalocsay sendube rajtas preni al si la kronon de la laŭreateco poeta. Sentante sin ofte devigata priŝuti la liniojn per novaj radikoj, tentate ofte ĝis plenumo utiligi gramatikajn formojn scitajn de li el aliaj eĉ strangaj lingvoj, li renkontos akran kritikon de

diversaj plumoj. Sed la milmil fadenoj de sana prudento, enteksitaj en la ŝtofo de nia popolo, forte rezistos ĉiun destruman fineon. Mute la netaŭgaj, neasimileblaj formoj morte kuŝos en nekomprenataj linioj, efikante neniel sur la idiomon ankoraŭ ĉiam vivigatan per la lipoj de la praktikantaro.

(Robo.)

MENCIOJ.

Vivaraiz, Vals-les-Bains, Francujo, 16-paĝa gvidlibreto por ĉi tiu saniga regiono. Ilustrita per bonaj fotoj Havebla ĉe La Suda Kruco kontraŭ penca p. marko.

Ilustrita Katalogo de Libroj eld. de Heroldo. A work of art. Most books photoed for you and described in detail. Printed on gloss paper, 24 pages of it. Senpage havebla.

Kuo Min Universitato, Canton, Ĥin-ujo, sendas "alvokon al la tutmondo kontraŭ la japana buĉado en Manĉurio," 4-paĝa denuncio en bona Esperanto. Notinde, ke la orientanoj enkondukas neologismojn "asasini," "retreto." "Alie" (Aliie, aŭ aliloke); "terurigi" (teruri). Kontraŭ penca p. marko havebla ĉe La S.K.

"Essenza e Avvenire dell'idea d'una Lingua Internazionale." Itallingva traduko de la fama teksto el la "Fundamenta Krestomatio," verkita originale de d-ro Zamenhof sub pseŭdonomo Unuel. Kun antaŭparolo kaj notoj de R. Orenko. Ni tre gratulas niajn italajn samcelanojn pri ilia revigligo kaj precipe pri la eldono de ĉi tiu ege valora propaganda broŝuro. Ĝi estu la heroldo de vico de similaj! Prezo 2 liroj ĉe Esperanto-Centro Itala, Galleria Vitt. Emanuele 92, Milano.

WORTERBUCH ESPERANTO-DEUTSCH.

Ĉiu Esperantisto povoscianta aŭ lernanta la germanan lingvon saĝe farus turnante sin al d-ro E. Pfeffer, Steyer-muhl-Verlag, Tagblatt-Bibliothek, Wollzeile 20/22, Wien 1. Tiu firmo jam eldonis tre malkaran vortareton (prezo nur 0.30 ormarko), kiu enhavas ĉiujn radikojn oficialigitajn kaj la plej komune uzatajn fakesprimojn. La konforma Deutsch-Esperanto vortareto ankaŭ estas havebla samadrese. Prezo 18p.

KION LEGI?

Ĉe kursfinoj ofte levigas demando, kion rekomendi al la legema progresinto por ties literatura regalo kaj pliperfektigo? Respondante la demandon per sugesto, ni donas la titolojn de verkoj nepre interesaj, bonstilaj, kaj legeblaj kun minimumo da cerbostreĉo. Rimarku bone nian celon! La juna paŝanto sur la belan tapiŝon de nia verkaro tre eble ne povas digesti la subtilaĵojn de la "Cikonio-Kalifo," unu el niaj plej gravaj tradukoj, aŭ la frapan stilon de "Mr. Tot." Komencire li bezonas pli asimileblan nutron. Tial la elekto ne estas ĝuste el la plej valoraj verkoj en nia literaturo; ekzemple, la traduko de "La Karavano" estas laŭ literatura kaj lingva vidpunkto multe malpli valora ol tiu de "La Rabistoj," kiun ni ne rekomendas al la simpla kursfininto. Por anglalingvanoj bona konsilo estas legi nur verkojn faritajn de homoj kies gepatra lingvo ne estas angla.

Unuarange ni metus "La Vivo de Zamenhof" (Privat). Tiam en nia rakonta literaturo elektindaj estas: la interesa "Ido de Orfeo" (originalo de Bulthuis), supoze la plej populara el liaj verkoj; la kortuŝa "Marta" (Orzeszko, trad. Zamenhof), valora precipe pro tio, ke en ĝi Zamenhof uzas milojn da ĉiutagaj terminoj; tiu tragedio de du naive puraj animoj, "Paŭlo kaj Virginio" (B. St. Pierre, trad. Hodler); "La Interrompita Kanto" kaj "Bona Sinjorino" (trad. Kabe), "Rusaj Rakontoj—Fabeloj al Helenoj" (trad. Kabanov), "Nobela Peko" (trad. Morariu), "La Kapitanfilino" (trad. Ŝidlovskaja). Post kiam la studento legis tiujn aŭ almenaŭ la haveblajn el ili, profite li turnus sin al unu plej majstra kolekto de noveloj, "Dancu Marionetoj" (originalo de J. Baghy). Per tio li sentus la kontraston inter la "klasika" skolo de la antaŭmilitaj tagoj kaj la moderna, plievoluema de la nuna tempo. La trivoluma "La Faraono" (Prus, trad. Kabe), pro ĝiaj studinda frazglateco kaj katena intereso, meritas fruan atenton. La lasta kvalito precipe montriĝas en la dua kaj tria volumoj. Ĉi tiun gloran fortostreĉon Kabe fide entreprenis, kiam ankoraŭ ekzistis nur kelkcentoj da Esperantistoj en la mondo. "For la Batalilojn!" (Suttner, trad. Caumont) bedaŭrinde ne estas plu listita de la B.E.A. Petu ĝin ĉe la klubaj biblioteko. Longlonge restas ĉe leginto la impresoj, kiujn la verko batas en la animon.

Pri la verkoj de anglalingvanoj ni citu la originalon de Luyken, "Pro Iŝtar," tian de A. Sinnotte, "Lilio," "Tatterley" (Gallon, trad. Wilson), la preskaŭ perfekta "La Karavano," el la germana de Hauff, trad. Eggleton, kaj la "Alegorioj el la Naturo" (Gatty, trad. G. Gordon). Mendu ĉe B.E.A. Finvorte, ĉu estas necese menci la Biblion, la kronverkon? Ĝi estas la ĉe-kubuta kunulo de ĉiu Zamenhofano arde sciema pri la majstra modelo, kaj kiu fervore sopiras alproprigi al si almenaŭ fajrereton de tiu stila genio per kiu la amata doktoro mirigas la mondon.

TO THOSE CONCERNED.

Kara S,—

We feel it necessary to approach you once more in the hope that you may inform us of your attitude to our enterprise, the publication of LA SUDA KRUCO—whether, in spite of your silence in the matter, you yet appreciate the paper and wish its continued service.

The periodical mailing of intimations to lapsed subscribers is a felt drain on our slender resources, and we are wishful, by the response to this circular, to clear from debt the names of many such readers, who, for this reason or that, have not seen fit to answer our several reminders to them.

In spite of adverse circumstances we have sufficient confidence in the worth of our labor to persevere in it and to struggle on to participation in final victory, if this is by any means possible.

Will you not encourage us by at least replying to this appeal and so help, even negatively, in relieving the editor from the disappointment he feels at so much apparent indifference.

Yours truly,

La Redakcio.

NEKROLOGO.

Ni tre bedaŭras sciigi pri la morto de s-ro Laŭri Laiho, finna ĵurnalistoj, kiu vizitis Melburnon tempe de la ĉiurba kongreso en 1925. Li kunlaboris kun s-ro M. Hyde super la verko "Aŭstralio, Lando kaj Popolo," kiu poste estis tradukita en la finnan lingvon. Li mortis la 4an de januaro kaj estis solene cindrigita la 10an. Niajn korajn kondolencojn al la koncernatoj.

TO OUR SUPPORTERS

Thanks for the following: Mr. W. Middlesborough, 4/6, Sep., '29; Mr. A. J. Davern, 4/6, Jan., '33; Mr. H. Facer, 5/-, May, '33, and gift, 2/6; Miss de Novak, 5/-, April, '33; Miss C. Bauer, sales 3/-; "Iama Rondano," 15/-; Miss E. M. Hynd, 4/6, Jan., '32; Mr. O. Behncken, 5/-, Mar., '33; Mr. J. McDonald, 4/6, April, '33; Mr. W. L. Edman, 10/-, Oct., '33; Adv., 2/-; Miss M. Helm, 10/-, Feb., '34; Mr. P. Holmes, 2/3, July, '32; Mr. D. B. Thomson, 5/-, Mar., '33.—Total, £42/9.

"RUMANA BONHUMORO."

Tradukita de P. Firu kaj S. Pragano.
Ce L. Moreau, Raapopscheweg 55,
Arnhem, Nederlando. Broŝurita 2 sv.
fr., tole bindita 3 sv. fr.

La rumana literaturo okupas relative mizeran lokon en la Esperanta verkajaro. La jam publikigitajn tradukojn oni povas denombri sole per la fingroj. Des pli bonvena do estas ĉi tiu kvino de elektitaj rakontoj, en kiuj la tradukintoj evidente pensis "prezenti ĝuste la specifaĵojn de (la rumana) popolo, ĝuste tion, kio iomgrade diferencigas nacion de nacio." Plejparte ili sukcesis en tio, donante jen la naive sagacan babiladon de la kampulo, jen la malpacienca abruptecon de febre aferplena komizo.

"Du Lotbiletaj" kaj "La Venkinto de Napoleono" perride streĉas la legantan vizaĝon ĝis finsorbo de l'lasta linio. En "Oĉjo Johano Rado" la tradukanto provas konservi la aromon de la originala lingvaĵo, sed je tio li ne ĉiulinie trafas la celon, ĉar nerumanojn cerbumigos la monstro "cemilite reirite kaj ĉedonace sinpuŝemo" P. 32. Ofte sin trovas la malĝusta formo "terurigite, terurige" (terurite, terure); 17. "ekis bluan ridegon" (subite elpuŝis amaran ridegon?); 20. "reklamaci" (krie plendi?); 23 lasta linio "ŝia" (ĝia); 28. "fruntajn" (ĉefajn); "venigo Jaŝon" (venigo al Jaŝo); 41. "konatuloj," iom ofta eraro eĉ ĉe cetera bonaj verkistoj. Tio ŝajnas esti senutila duoblaĵo de l'simpla formo -ato, kiu montras preskaŭ ĉiam personon, vivantan estaĵon. (Robo)

LUCIEN PERAIRE.

Ni informigis, ke ĉi tiu sinjoro mondvojaĝanto "pro nesufiĉeco da mon-

rimedoj ne sukcesis eniri Aŭstralion." Lia estonta adreso: Lavardac Lot et Garonne, France.

KORESPONDO.

Serĉas korespondantojn en Aŭstralio kaj ĉiuj landoj per il. pk. kaj leteroj diverstemaj s-ro Johann Wetzig, Regensburg, Auergr. 4, Germanio.

STILO.

Ja estas al mi mirinda la maniero laŭ kiu niaj lertaj verkistoj priskribas simplan situacion. Ekzemple, rimarku la jenon:

"Iun brilan matenon, juna viro gaje piediris sur arboflanka vojo." Neniel komplika, tio. Nur simpla, ofta diraĵo laŭ la stilo de vi kaj mi, kara leganto. Sed ĉu la verkisto dirus ĝin tiumaniere? Kompreneble ne! Li devas envolvi ĝin en dolĉajn, belsonajn al la orelo frazoj ĝis la bildo enkadriĝas en rando orvorta.

Imagu ke la supran frazon skribus
Jean Forge.

Hela mateno! . . .
Brila sunleviĝo promesas belan tagon.
Birdoj trilas sur la arboj. Kaj roskovrita verda tapiŝo odoras frese, dolĉe . . .

Kion do fari?
Ha, ideo! Piediri!
Senge mi paŝas sub la ombrigaj arboj. Per malrapidaj paŝoj. Kun ĝojo en la koro. Antaŭen . . .
Mi, Mateo Gazuka, trovas inspiron en senhoma vojo . . .

Denove, supozu ke la sama ideo trafus

H. A. Luyken.

Belega, paca vojo etendiĝis antaŭ la serenaj okuloj de juna sinjoro, piediranta en la ombro de la altaj, majestaj arboj dum la frueco de la hela mateno.

Li estis altkreska, beltalia viro kun belforma kapo, kovrita de ruĝbrunaj, krispaj haroj, kaj liaj belaj vizaĝtrajtoj montris spiritan trankvilecon malgraŭ la iom gaja mieno kaj viveca sintenado. Sincereco kaj poeziemeco montriĝis en la formo de liaj oreloj kaj la rekta nazo indikis artemecon kaj amon al ĉiuj belaĵoj. La firma mentono kaj kompatema buŝo donis impreson de forta amikemeco kaj granda kuraĝo, kiu impresis estis pliigita de la fortika nuko.

La roskovritan herbon briletigis la leviĝanta suno, donante aŭron esper-

plenan al la tuta ĉirkaŭaĵo.

Certe amversigus ĝin en sia propra, neĉimitebla maniero nia nesubpremebla samideano **Raymond Schwartz**.

Je hela mateno junviro eliras,

Junviro eliras je hela mateno.

Dum gaje li marŝas, feliĉon sopiras

Kaj revas pri amo en ĝoja plenpleno.

Al ĉiu la amon printempo pensigas,

Printempo pensigas al ĉiu la amon.

Kaj rosekisitaj la arboj instigas

Al birdoj ennesti, al inoj . . . ornamon.

Sed ĉiam demono malhelpas rikane,

Malhelpas rikane sed ĉiam demono

Amrevojn junvirajn printempajn tirane.

Nomiĝas li bone—la manko de mono.

(R. J. Yarworth, in "International Language.")

RESPONDOJ.

(1) 1920.

(2) Reĝino Adelaide, edzino de angla reĝo, Vilhelmo Kvara.

(3) La ĉevalaĉo de Don Kihoto.

(4) Ĉe Vailima, lia samoa terpeco.

(5) 2400.

(6) 11 futoj.

(7) Lordo Sydney, angla internafera sekretario, 1788.

AŬSTRALIANO RIGARDAS AL KATALUNUJO

de M.S. en "The Age" (Melburno) la 25an de julio 1931.

Senor Campalana, la ministro de publika instruado en la nova kataluna ŝtato, diris, ke Katalunujo ne deziras sin apartigi for de la cetero de Hispanujo, sed nur volas esti ŝtato de federacia respubliko. Li aldone asertas, ke Katalunujo estas pli sentimente apuda je Madrid en la nuna horo ol en ia ajn tempo pasintece.

Se Katalunujo decidus fluigi siajn altvalorajn vivfortojn en la novan Hispanujon tio tre probablus, ke freŝe revivigita lando emerĝos el la haosa komencigo de la hispana respubliko.

Forta kaj vigla estas la pulso de la vivo en Barcelono, la ĉefa komercurbo. Nur ĝin komparu kun tiu de la ceteraj hispanaj civitoj, kiuj minace, aroge estras la ebenaĵojn—civitoj rajthavaj pro aŭtoritato dia. La forto de ties vivpelo jam velkiĝis ĝis tio, ke jam restas ĉe ili nenio pli ol la mortema, barbara vegetado de la ciganoj, la almozuloj kaj la sociaj parioj.

La intensa, hejma patriotismo de la katalunoj ĉiam minacis la politikan unuecon de Hispanujo. Jam en 1469 Katalunujo estis unuigita kun Aragono kaj Kastilo per la interedziĝo de iliaj reĝuloj. Tamen, ĝi ankoraŭ retenis specialan konstitucion kaj aliajn karesatajn privilegiojn. Sed en 1640, ofendite de peza impostado de Felipe la Kvara, Katalunujo ribelis kaj elektis Louis la Dek-tria, reĝon de Francujo, ke li estu grafo de Barcelono. Jam de tiam Barcelono ne ĉesis ĵeti provokojn al Madrido. Katalunujo subtenis Aŭstrion ĉe la milito pri la hispana tronhavigo, sed finfine fariĝis politike hispana ŝtato en la milito por sendependado kontraŭ Napoleono.

Ne mirige do, ke la katalunoj rigardas hispanojn de ekster Katalunujo kiel fremdulojn. La kataluna temperamento estas tute nesimpatia kun tiu de kaj la kastilano kaj la andaluziano. La kastilano, kortegane ĝentila kaj memdependa, sed tre konservativa, sur sia praava terbulo sidadas, fierega pro sia "grandeza" (majesteco). Li malŝatas novaĵojn. La ligna erpilo de antikvo bone por li taŭgas. Male, la kataluno estas aferisto kaj akceptas kun plaĉo kondiĉojn de la moderna industrio. Tial li tute ne pacienas kun la majestate iranta Kastilo kaj la nelaborema Andaluzio.

En Barcelono estas malfacile taksii la veran katalunan spiriton. La tieaj religiaj kaj industriaj konfliktoj konfuzas la juĝkapablon. Ĝia aktiveco tro ekcitas, lacigas. Oni prefere foriru el kosmopolita Barcelono kaj iru pli suden,

KVAKERISMO KAJ PACO

Mi havas senpagajn specimenajn ekzemplerojn de literaturo (Esperanta kaj angla) pri Kvakerismo kaj Paco por disdoni.

Bonvole petu per ilustrita poŝtkar to aŭ letero. Ankaŭ mi sentus plaĉon ricevi nomojn-adresojn de eventualaj korespondantoj el plej malproksimaj mondpartoj.

DR. FRED. J. WILLIAMS,

Samarai, PAPUA.

(fratorganoj afable represu)

PARALLEL TRANSLATION

ANKORAŬ UNU VESPERA PREĜO.

Lord, receive our supplications for this house, family, and country. Protect the innocent, restrain the greedy and the treacherous; lead us out of our tribulation into a quiet land.

Look down upon ourselves and upon our absent dear ones. Help us and them; prolong our days in peace and honor. Give us health, food, bright weather, and light hearts. In what we meditate of evil, frustrate our wills; in what of good, further our endeavors. Cause injuries to be forgotten, and benefits to be remembered.

Let us lie down without fear, and awake with exultation. For His sake, in whose words we now conclude.

Ho Sinjoro, akceptu niajn petegojn por ĉi tiu domo, familio kaj lando. Defendu la senkulpulojn, malhelpu al la aviduloj kaj la insidantoj; konduku nin el nia aflikto en trankvilan landon.

Rigardu sur nin kaj sur niajn forestantajn karulojn. Helpu al ni kaj ili; longigu niajn tagojn en paco kaj honoro. Donu sanon, nutron, belveteron kaj korojn plenajn de gajo. Se ni pripensas fari malbonon, nian intencon malsukcesigu; se ni pripensas fari bonon, niajn penojn prosperigu. Donu, ke pasintaj nejustaĵoj al ni foriĝu el nia memoro, kaj ke nur bonfaroj tie restu.

Estu, ke ni kuŝigu nin sen timo, kaj releviĝu kun ĝojo. En la nomo de Li, per kies vortoj ni finas nian peton.

MATENA PREĜO.

The day returns and brings us the petty round of irritating concerns and duties. Help us to play the man, help us to perform them with laughter and kind faces, let cheerfulness abound with industry. Give us to go blithely on our business of this day, bring us to our resting beds weary and content and undishonored, and grant us in the end the gift of sleep.

Nova tago venas, portante al ni la negravan rutinon de ĝenaj aferoj kaj devetoj. Helpu al ni honeste fari, helpu al ni plenumi ilin kun ridado kaj bonkora vizaĝo; lasu, ke gajeco abundu kun laboremo. Donu, ke ni ĝojkore faru la devon de la nuna tago; al la lito konduku nin lacajn, kontentajn, kun honoro nemakulita, kaj en la fino donu la favorkoraĵon de la dormo.

(Robert Louis Stevenson)

en la apudmaran, ne tiel grandan urbon Tarragona. Tie oni povas serene observi la gajan aferemecon kaj optimismon, kiuj estas bonegaj trajtoj de la kataluna karaktero.

La civito sidas sur monteto; la Mediteraneo safrblue trembrilas malproksime sube. Jen tiu marbordo, pri kiu glorkantis Plinio kaj Martialo, la "aprica litora," la sunhela sablobordo de Tarragona. El ĉiuj romidaj civitoj en Hispanujo, Tarragona estas la malplej neinda je la patrinurbo Romo, ĉar ĝi fariĝis antikva sen kadukiĝo; ĝi estas civito vivanta.

Oni povus ĝin kompari kun Merida de Estramadura, kiu estas tipo de dekadencia romida civito. Jen afero por teruri la imagokapablon—historiĉa Merida, konita en sia flortempo, kiel la Romo de Hispanujo, kun 84 pordegoj kaj 3700 turoj, ĉe borde de la ŝtalblua rivero Guadiana; nun velki-

ĝinta ĝis vilaĝa amplekso, havanta gastejon tute nehispanan pro ĝia negastemeco. Enfermitaj en la domaj muroj oni trovas templajn kolonojn el marmoro, ruiniĝintajn ŝtonskribojn. Eksterapude la urbon sidas la malgranda Kapelo de Sta. Eutalia, konstruita en 1612 el restaĵoj de la roma templo de Marso. Jen ekzemplo el tio, kiel la popoloj, en la mallumo sekvanta la formorton de la roma potenco, komencis konstruadi siajn kompatindajn domverkojn, kunigante dispeciĝintajn kolonojn kaj rompitaĵojn arkitravojn, ĝisfine, sub iliaj fuŝmovantaj fingroj, evoluis ĝis kompleteco la ĉiun-miriga Romaneska stilo.

Tarragona restas civito romida. La koloron de l'suno ĝi havas. La ĉefstrato estas ankoraŭ ĉiam la Via Triumphalis de Romo; ĝi kondukas krute supren de la monteto ĝis la sunsaturita fasado de la katedralo, kiu

kolose elstaras kontraŭ fono el blua ĉielo, ĝustsame kiel iam faris tion la roma templo de Jupitero.

Verdire pilgrima vojo estas tiu kruta strato, kulminanta je giganta perono, kiu ankoraŭ supreniras al la ŝtonpavimita placo fronte de la katedralo: La katedralajn pordojn flankas la Apostoloj; staras meze la Madono de Majstro Bartoleme, tenante surkokse la Infanon. Vere ŝi montras talion tiel bele fleksmovan kiel tiuj de la virinoj, kiuj, portante dutenilajn kruĉegojn, en la nuna tago iradas al la putoj.

Matene la katedralaj gargojloj okulumas malsupren sur la rulsonadon kaj kriadon de la legoma vendplaco. Ruĝaj, verdaj piproj helbrile amas kuŝas tie sur la bulstonoj; lignaj bareletoj da olivoj, sakoj da kaŝtanoj, ŝnuroj da ajlo, montetoj da granatoj. Maljunulino en ŝalo kaj nigra jupo volas vendi kokon. Ŝi portas ĝin surbrake, etendas ĝin al tiu kaj tiu virino, por ke ili inspektu. Sed ili nur volas skuteni ĝin per ties maljunaj kruretoj, fingropuŝi ĝin, mokridante. La vendistino do ek-reprenas malpacience, tenas ĝin kvazaŭ suĉinfanon, mankaresas la plumojn de la kompatinda birdo, zumante al ĝi. Jen aliloke, gestanta viro en Ford-aŭto vendas skarpojn, longajn je plena sesmetro. Li laz-maniere ĵetas ilin trans la kapojn de apudstarantoj, por ke virinoj ĉe la homamasa rando povu mem taksii la valoron. Simieto kaŭras sur la ventŝirmilo de la aŭto, sin gratante, kaj, distrite, ankaŭ sian lankovrilon. De la altaj muroj pendas birdodometoj kaj malgrandaj kaĝsimilaj balkonoj el fero; ŝnuroj da ruĝaj piproj, sekiĝante, sin tenas ĉe la fenestroj. Vesperige flagroj eklumas en la nigre-internaj butiketoj de la urbo malnovmonda. La moderna urbo, kun ĝiaj du larĝaj, arbe ombrataj promenvojoj kaj belaj konstruoj, ne estas neinda je la malnova.

Fininte la taglaboron, preskaŭ ĉiu urbano vage iras al la Rambla Sta. Juan, por trinketi ĉokoladon en kafejoj, aŭ diskuti politikon subarbe. Tintadas rido, pli bonkora, malpli mokaroga, ol tiu de la Sudo. Oni povas legi, klare gravuritajn en la bronzvangaj vizagoj, la humoron kaj pensosanon, kio estas la heredo al Katalunujo.

Eraro: P. 346, 2a Kol., L 10, "pentre" (legu: penetre).

Westralian Esperanto Society, Perth, W.A. kunvenas ĉiusemajne. Prezidanto, s-ro H. Byatt, D.B.E.A.; sekretario, s-ro David Miller, 73 Berwick-st., Victoria Park, Perth. Komunikajojn al la sekretario.

Masterton Esperanto Group—Meet every Tuesday at 8 p.m. in the Y.M.C.A., Church-st., Masterton. Hon. President, Mr. G. R. Sykes, M.P.; President Mr. A. Dewar D.B.E.A.; Vice-Presidents, Mrs. McNab and Mr. B. Johns; Secretary, Mr. Howard Franks, 38 Workop-rd. Visitors always welcome.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikajojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes, D.B.E.A.; sekretario f-ino V. Cox, D.B.E.A. Adreso, Box 731F, Elizabeth-st., P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots' Church Hall, 97 Russell-st. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 18^{1/2}a horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbana Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str., proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: s-ro F. T. Simon. Vicprezidantoj: s-roj H. Hutton kaj S. Parry. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. U.E.A.). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, G.P.O., Brisbane (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meets every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A.; Vice-President, Mr. E. C. Jack; Secretary, Miss G. Carty, 33 Tanera-cr., Brooklyn; Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.